



ORGANO DE TUTMONDA ESPERANTISTA JURNALISTA ASOCIO (TEJAJ)

A. Berg — akademiulo
D. Armand — d-ro pri la geografiaj sciencoj
E. Bokarev — d-ro pri la filologiaj sciencoj

64 LINGVOJ KAJ ANKORAU UNU

La lingvo de la scienco. Kiel oni ĝin faru komprenebla de ĉiuj? La pridiskuto de tiu ĉi problemo oni komencis ne delonge en „LG“*. Daŭrigante la parolon, la aŭtoroj de la publicitaj nun materialoj starigas demandojn, kiuj tuŝas la sciencajn informadon en larĝa plano. Kiel oni faciligu la komunikigon de la specialistoj parolantaj en diversaj lingvoj? Kion oni devas fari por ke ne malpurigu la senfina oceano el informadoj per senutilaj sciigoj! Kaj fine, kiamaniere oni ekposedu profesian nivelon de la popularigo de la sciencaj konoj?

Ĉiam pli ofte antaŭ la scienco elkreskas taskoj, kiujn oni povas solvi nur laŭ la vojo de la senpera kunlaborado inter la scienculoj de la tuta mondo. La esploroj en la kadroj de la Internacia geofizika jaro, la Internacia biologia programo, la esploro de Antarktido, la kunlaborado en la batalo kontraŭ la kancero, la esploro de la kosmo laŭ sia esenco postulas multlingvan interŝanĝon de informado.

La patentojn de ĉiuj landoj oni preparas en ŝtata lingvo—ĝenerale en kelkdekoj da lingvoj. La nombro de la patentoj superis 13 milionojn kaj plimultiĝas ĉiujare per 300 miloj. Ĉu estas necese ke ni miru, ke ilia komparo estas tasko ekskluzive malsimpla?

Krom la lingvo, en kiu estas verkita la patento, oni bezonas posedi ankaŭ la specialan terminaron.

La posedo de la ĉefaj eŭropaj lingvoj jam estas nesufiĉa por ke la scienculo povu sekvi la mondan sciencajn literaturon.

Ekzemple preskaŭ la tuta japana perioda scienca literaturo estas presata en patra lingvo. La socialismaj landoj publikigas materialojn en siaj lingvoj. Ĉe provo oni ĝeneraligi la materialon pri la klimato de Afriko okazis bezono ke oni sciuj 25 lingvojn, kaj ĉu ne, ankoraŭ ne ĉiuj lingvoj de tiu ĉi kontinento havas literaturon. Oni povas supozi ke dum la venontaj jardekoj altrudiĝos malmultiĝo de la nombro de la publikigoj en angla, franca kaj germana lingvoj kaj pligraviĝos la rolo de japana, hinda, araba lingvoj, suaheli.

Kion fari la specialistoj, kiuj ne scias tiujn lingvojn?

Oni povas, ekzemple, imagi tian perfektigitan sistemon por informado, ke ĉiu specialisto povas rapide ricevi la bezonajn al li informojn en sia patra lingvo. Tamen tiu ĉi vojo alkondukos ĝis troa pligrandigo de la nombro de tradukaj eldonaĵoj. La eldonejoj „Mir“ kaj „Progres“ eldonas librojn tradukitajn en rusan lingvon el 43 lingvoj, kaj siavice tradukas el rusa en 30 ĉefajn lingvojn en la mondo. Tamen el rusa lingvo sciencan literaturon oni tradukas tre malmulte, tio estas ne profitdona, ĉar en ĉiu lingvo estas malgranda nombro da specialistoj en donita demando kaj tio kondiĉas malgrandajn preskvantojn de la eldonaĵoj.

La ĉefa toronto de scienca informado iras pere de serioj eldonaĵoj kaj revuoj. En la tuta mondo oni eldonas ĉirkaŭ 400 referatajn revuojn, reflektigantajn iel la scienc-teknikan informadon.

En Moskvo, krom la 63 fakaj, troviĝas ankaŭ 3 centraj informaj oficejoj kaj la plej granda en la mondo Tutunia Instituto pri scienca kaj Teknika Informado (VINJTJ).

Tien ĉi amasiĝas literaturo en 64 lingvoj el 108 landoj en la mondo. Ĉirkaŭ 2 miloj kaj duono da ŝtataj kunlaborantoj trarigardas pli ol 15 mil fremdajn revuojn kaj post tio ilin transdonas al 22 miloj da ne etataj referantoj. La Instituto prilaboras dum la jaro iom malpli ol miliono da artikoloj kaj malgraŭ ĉio la produktado de JNJTJ ne

ampleksas la literaturon pri konstruo, vilaĝmastrumo, medicino kaj sciencoj pri kulturo kaj historio.

La prilaborita informajo ne distingiĝas per ĝusteco, ĉar ĉiu publikigaĵo submetiĝas je 6—8 operacioj: klasifikado, referado, redaktado ktp. . . Tio estas tipa ekzemplo de multkontakta ligo. La sumo de la eraroj en la diversaj etapo de prilaboro alkondukas ĝis perdo aŭ laŭ la terminoj de la kibernetiko ĝis entropio de la informado. La eraroj estas multaj, ĉar estas malebla oni trovu specialistojn — tradukistojn — en 10 miloj mallarĝaj profi'oĵ (64 lingvoj kaj 164 branĉoj).


Malrapide fariĝas la liverado de la informajo al la uzanto: en la referataj eldonaĵoj de VJNJTJ ĝi alvenas ĝis leganto post 5—12 monatoj, kaj en la libroj iufoje 3 jarojn post la publikigo de la materialo.

Ne estas malpli kaj ĉe parolaj tradukoj. Ĉe ni en la Palaco de la kongresoj ekzistas ekipaĵo por sinkrona traduko en 28 lingvoj. Tamen se oni prenos la orelakeptilojn, oni povas aŭdi la oratoron en plej bona okazo en 6—7 lingvoj, ĉar por la ceteraj oni ne povas trovi tradukistojn kaj kiam komenciĝas respondoj al la demandoj kaj disputoj (debatoj en la orelakeptilojn oni aŭdas nur forte misajn fragmentajn frazojn.

„Efektive sovaĝa spektaklo“, — skribas Joan Bernal, — prezentas multajn personojn kunvenintajn je scienca konferenco, kiuj tute same estas vestita, same aspektas, tuŝas, kiel bonege sciante de ni, per siaj pensoj kaj ekonoj preskaŭ identajn ĉiojn kaj malgraŭ ĉio estas absolute nekapablaj interrilati kaj bezonas la servojn de tradukisto.

Oni bezonas elpensi radikale plej bonan rimedon por interrilato, aparte nun, kiam la mondo fariĝas aganta kompleksa, en kiu la babela miksiĝo de lingvoj aperas kiel terurigaj katenoj.

(Daŭrigota)



Jordan Popov — Varma laboro

Ĉiuj membroj de T.E.J.A. estas petataj tuj sendi sian membro — aŭ abonotizon por la pasintaj kaj por la nuna 1969 jaro al la komitatanoj, al la reprezentantoj de T.E.J.A. aŭ rekte al la redaktoro de „Internacia Ĵurnalisto“!

Niaj kolegoj rakontas

MIA PRELEGOVOJAĜO EN USONO

La jaro 1949 estas por mi jubilea. En 1929 mi eklernis Esperanton en mia hejmurbo Fahum en Egiptio kaj en 1949 — antaŭ 20 jaroj — mi komencis mian prelegvojaĝon en Eŭropo. En la lastaj 20 jaroj mi faris pli ol 4000 prelegojn pri mia patrolando la Unuiĝinta Araba Respubliko en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj.

Ĉi jare, la 27-an de aprilo mi elflugis de Frankfurto sur Majno, GFR, al New York, USA, per Boeing 707 de „World Airways“ kaj atingis Novjorkon post sĝphora flugo. Tie mi atendis s-rojn Mark Starr, v. prezidanto de ELNA kaj direktoro de la Esperanto-Infom-Oficejo en la urbo, kaj mia malnova korespondanto Rolf Bonzper. Ili lasis min ripozi ĉar morgaŭ oni ekspluatos min. Kaj vespere la sekvanta tago mi estis intervjuita de tri radiostacioj, ankaŭ de „Voice of America“ en angla lingvo dum 20 minutoj. Vespere mi prelegis pri Egiptio en la klubo de la lokaj esperantistoj kaj montris kolorbildojn.

Malgraŭ taca, tamen mi devis la postan tagon ekvojaĝi al Kalifornio al la bela urbo Fresno per aŭtobuso de „Trailways“, preskaŭ 5000 klm. La veturo

daŭris 72 horojn seninterrompe. Kaj mi sukcese gastis: ĉe estis la 2-an de majo la kaliforniana Esperanto-kongreso. La vojaĝo estis laciĝa, sed tre interesa, ĉar per avropilanoj aŭ per trajno oni ne povas rigardi tiom da interesaj vidindaĵoj, kiol veturante per aŭtobuso. La 5a Esperanto kongreso de Kalifornio en Fresno estis vizitata de pli ol 8) gesamildanoj el ĉiuj partoj de la regiono. Tie mi rez prelegis pri mia naskiĝlando — unuigita Araba Respubliko.

Post la kongreso mi estis invitita de la familio Francis Helmut — prezidanto de Nordamerika Esperanto Ligo, En ilia hejmo en San Diego mi restis tri tagojn. En la urbo mi prelegis antaŭ la E-grupo kaj en tiu popollernejo. La redakcio de fama gazeto „Evening Tribune“ en tiu urbo intervjuis min kaj aperigas tre bonan artikolon pri mia vojaĝo kaj pri Esperanto. Poste mi vizitis Los Angeles, kie mi prelegis por komencanta E-klaso de s-ano Gren. Mi daŭrigis mian vojaĝon al San Francisko gastante al g-s-roj Schulze. S-ino Schulze guidas Esperanto-informcentron por Kalifornio kaj Okc. Ameriko. Lu geedzoj Schulze aktive laboras por Esperanto

kaj oftaj hvas gastojn el diversaj ciliaj landoj. Mi parolis al la infanoj de Lernejo en San Mateo, Lernanĵoj la Internacian Lingvon, kaj ankaŭ antaŭ la loka radio stacio.

De San Francisko komencis rez granda — 30 hora vojaĝo — al Gallup en Nova Meksiko, kie mi vizitis la familon Stone. S-ino Roan Stone estas tre konata esperantistino, ŝi tralikis „La Profeto“n de Halli Gibran. En jaro 1938 ŝi akompanis dum prelegvojaĝo Lidia — la filino de L. L. Zamenhof tra Usono. En Gallup mi parolis ĉe la radio stacio. Pri mia vizito aperis artikoloj en du lokaj gazetoj. Mi akompanis s-anojn Stone al la „Indiana Rezervojo“ en la ŝtato Arizona, centro de usonaj indiĝnoj, kie mi vizitis ilian vivmanieron. Ili havis proprajn lernajn kaj lernas en indiĝna kaj angla lingvoj. Ni provis interzigi iajn el la instruistoj pri Esperanto.

Mi vizitis poste Indianopolis, Chicago, Montreal en Kanado kaj de tie — rez Novjorkon. Tie ĉi la afabla s-ro Bonzper guidis min al la fama „Empire State Building“ — la plej alta konstruaĵo en la mondo. De ĝis supro grandega kaj altega „nubskrapulo“ pli ol 450 m alta, mi povis vidi la pejzaĝon de la urbego New York.

Mia gastado kaj veturado finis. Mi traveturis pli ol 1500 kilometrojn en Usono kaj Kanado per aŭtobuso por nur 99 dolaroj dum unu monato. Ne ĉiujn invitojn mi plenumis pro manko de tempo. Sed dank' al la afablaj gesamildanoj usonaj mi sukcesis multon vidi kaj travivi. Sinceran dankon al ĉiuj.

D-ro Tador Megalli

Parto de la partoprenantoj de la prelego de s-ano D-ro Megalli en Novjorko, USA



SAMIDEANA INTERPAFADO

„La Suda Stelo“ — revno socia, kultura, literatura, primovada de la Jugoslavia Esperanto—Ligo rice tuŝas la demandon pri la esperantistaj disciplino kaj mendisciplino. En n-ro 2—3, julio 1939, sur paĝoj 36 kaj 37 estas tri polemikaj materialoj. La unua estas respondo de Antoniĉe. Sekelĵ al la prezidanto de Jugoslavia Esperanto—Ligo Prof. B. Popoviĉ kiu, en fruntartikolo sub la titolo „Individualeco kaj disciplino en nia Movado“ aperinta en n-ro 5—6 de LSS kritikis la fratinojn Sekelĵ pri ilia agado en IOE, en s-to „Nova Vojo“ kaj en „Esperanto-Turismo“. En la pasinta n-ro de „Int, Journalisto sub la titolo „Paca interpafado tra la gazetaro“ ni menciis pri la materialoj en LSS, komentinte ilin.

Nun, sub la sama titolo

„Individualeco kaj disciplino en nia Movado“

A. Sekelĵ en la organo mem de JEL refutas kiel kalumniaj la kritikon de Prof. Popoviĉ.

„Krom kelkaj linioj kiuj koncernas alian personon, — skribas A. Sekelĵ — la tuta artikolo estas verkita kontraŭ „Esperanto-Turismo“, „kiun kreis—ekster JEL — du „ĉiamaj malkontentuloj“ sub kiuj la aŭtoro (Popoviĉ — rim. Esp-v) sendube kredas identigi min kaj mian fraton. Krom tio, aperas kelkaj ofendoj kaj kalumnioj, ĉar la aŭtoro ne konsultis ankaŭ tiujn k’ujn la artikolo koncernas, kaj unurilanka kondamno ne estas akceptata man’ero in’er prudentaj homoj“. . . Sube A. S. skribas:

„La aŭtoro riproĉas al ni pro obstina individualismo, nerealeco, memadorado, fana-

tikeco, ktp. Ŝajnas al mi ke prezidanto de tutlanda organizajo devus esti pli singarda ĉe la elekto de ofendaj vortoj, aŭ tuj pruvu tiujn asertojn unu post alia“. . . Kaj plue A. S. skribas:

„Mi estas profesia oficiro, dum mia tuta kariero mi ne estis punita, eĉ neniam admonita pro maldisciplino, kaj atingis la rangon de kolonelo. Mi ne akceptas lecion pri disciplino, ĉar mi kiel fakulo pli bone scias kio estas disciplino“.

Sub la „respondo“ de A. Sekelĵ estas alia titolo

„Anstataŭ respondo“

en kiu Prof. Boj. Popoviĉ refutas la refutojn de Sekelĵ.

„Mi estas por konstanta serĉado de novaj vojoj por endukado de Esperanto en diversajn kampojn de praktika vivo — skribas Popoviĉ kaj konfesas ke — „Pro tio mi eĉ permesalis ĝis antaŭlonge ke mia nomo troviĝu sur la listo de la direktoroj de IOE, malgraŭ ke mi neniel direktis kaj malgraŭ tio ke mi konsilis ĉefajn gvidantojn de IOE kiel troigatojn en multaj aferoj, ne povante ofte distingi la realigeblan de la nerealegeblan. . .“

„Suriĉas du—tri jaroj por vidi ke „novaj vojoj“ fariĝis tre ofte abomenaj vojoj al skismo en nia movado, altriarante de aktivuloj surbaze de klaĉado de la ĝenerala Esperanto—movado kiel „arkaiĝinta“, „konservatista ktp.“ Kaj tiel plu

Jordan Popov



„Kolegigita muzo

en la sama signifo.

Kaj la tria materialo, sub titolo:

Pretere: Kolonelo kaj kaporalo

estas plia respondo al la respondo de Sekelj.

„Antonije Sekelj estas ĝenerala sekretario de IOE, „Esperanto—Turismo“ estas sekcio de IOE, kaj mi (la aŭtoro SM) ne akceptas lian deklaron ke li kun la agado de tiu sekcio havas neniajn ligojn. Eble li ne havas, sed li devas havi. . .“ Kaj sube:

„Mi neniam estis oficiro eĉ rezerva, d.r malpli profesia. Por la kolonela rango de Antonije Sekelj mi havas plenan est. mon


sed al lia interpretado de la disciplino en 1^a Movado ni ne sentas inklinon. Mi ne sukcesis demandi la novan prezidanton de JEL kian rangon li atingis en nia armeo, sed estas evidente, ke Antonije Sekelj lekciis al li samkiel almenaŭ siatempe la kolonelo lekciis al la kaporalo. (sm)“.

Ni atendu en la organoj de IOE kaj JEL novajn pacajn interpafadojn. Bedaŭrinde tiuj interpafadoj tuŝas ankaŭ la tutmondan Esperanto-Movadon.


lv. Esperov

Jordan Popov

Jordan Popov




La varma laboro de la Journalisto



Sen vortoj

JURNALISTA KARIKATURISTO

En la nuna n-ro de nia organo ni aperigas kelkajn karikaturojn pri-journalistajn de Jordan Popov, aperintaj en la revuo „Demokratia Journalisto“.



Sur la marbordo, apud Varna, en nigramara ĉirkaŭaĵo, verda kaj sunrad'a, inter marripcezoj „Druĵba“ (Amikeco) kaj „Zlatnite pasaci“ (la Ora Strando), troviĝas la unua Internacia ripozdomo de ĵurnalistoj. Liaj du grandaj, rigardantaj la maron kvaretaĝa kaj dektrietaga konstruaĵoj staras fiere inter verdaj parkoj, florageoj, fruktĝardenoj kaj vinberkampoj.

La ĵurnalista ripozdomo jam havas sian dekjaran jubileon. Ĝi estas ido de la amikeco kaj solidareco inter la demokratiaj kaj progresivaj ĵurnalistoj de la mondo, de la energia entreprenemo kaj gastameco de la bulgaraj ĵurnalistoj. La ideo konstrui ripozdomon naskiĝis kaj pridiskutiĝis dum ra Unua tutmonda renkonto de ĵurnalistoj en Helsinko 1956. En 1958 en la Kvara kongreso de IOJ la bulgaraj ĵurnalistoj informis, ke la bulgara registaro aprobis la projekton kaj donas rimedojn por la konstruado. La unua (la kvaretaĝa) konstruaĵo estis preta en 1959. En ĝia meblado partoprenis iuj fraĵaj ĵurnalistaj naciaj unuiĝoj.

Dum sia sepjara funkciado ĝi akceptis pli ol 9 000 ĵurnalistojn kaj iliajn familianojn el dekoj da landoj. Ili trapasis po 20 ripoztagojn neforgeseblajn en amuzoj, konversacioj amikaj, estis aranĝitaj ekspozicioj, karnavalaj vesperoj, vesperoj de la mardio Neptuno k. a. Oni ekskursis kaj vizitis la belajn kaj plenajn je vidindaĵoj ĉirkaŭaĵoj de Varna, de la bulgara marbordo ktp.

Post sep jaroj — est. 1966 larĝe malfermis siajn pordojn ankaŭ la nova dektrietaga belega konstruaĵo de la ĵurnalistoj kun la helpo de la bulgara registaro. Arkaŭ ĝin planis kaj konstruis la talenta arkitekto Nikola Nikolov. Anstataŭ 200 ripozantoj en ripozŝanĝo, oni jam akceptas 400 kaj entute dum la ripozsezono (printempo, somero, aŭtuno) tie ĉi gastas 3 500 homoj. Ĝis nun ripozis entute 15 000 ĵurnalistoj kaj iliaj familianoj. Tie ĉi ili ripozis, resaniĝis, amuziĝis, ekskursis, sportumis en freŝa aero, sub sunaj radioj, en gastameca kaj amikeca atmosfero, plifortigante siajn amikecon kaj solidarecon profesiajn. . .

En la ripozdomo oni trovas agrablecon, senbruecon, trankvilecon — enute krea atmosfero por vera ripozo, distraĵo okupiĝoj, interparoloj, ŝak—kaj aliaj ludoj. La strando estas mirinda — sub la sunaj sanigaj radioj, karesaj ventoj, en la ĉirkaŭbrakoj de la ŝaŭmantaj marondoj, aŭ sub la grandaj sunŝirmiloj, sur la varnega sablaro, aŭ en balanciĝantaj barkoj, fiŝkaptante, kriante, kantante . . . Ĉiam oni trapasas plezuregajn minutojn.

En raportajoj, vojaĝimpresoj kaj skizoj, revenante hejmen, la ripozantoj en diversaj lingvoj rakontas entuziasme al la leganto pri siaj ĉarmaj travivaĵoj en la Internacia ĵurnalista ripozdomo apud Varna—belega bulgara urbo.

Nikola Tomov

ĈU VENKO?

TEĴA RENKONTIĜOJ EN HELSINKI

La Kongreson en Helsinko ĉeestis multaj TEĴA—anoj kaj ĵurnalistoj. Ne partoprenis ĝin ankaŭ la ĝenerala sekretario kaj redaktoro de „Internacia Ĵurnalistiko“ Ivan Keremidčev—Esperov, ĉar oni ne sendis al li invitilon-deklaron el Finnlando.

Tamen en Helsinko estis la prezidanto de TEĴA s-ro Olan Thormodsen el Haugesund, Norvegio, la vicprezidanto Niilo Kavenius el Turku, Finnlando, d-ro A. Mildfœurt el Anglio, Dino Fabris el Italio k. a.

Jarkuvœno de Tutmonda Esperantista Asocio ne okazis, tamen la ĉeestintoj en apartaj renkontoj pritraktis tiujn demandojn koncerne la agadon de TEĴA.

Jen koncize la leterraporto de s-ano Kavenius, sendita al nia redakcio:

La kongreson partoprenis membroj de TEĴA, kun kiuj ni interŝanĝis opiniojn. Mi devas konfesi, ke aŭdiĝis ankaŭ kritiko pri la pasiveco de la TEĴA—estraro. S-ano Thormodsen kaj mi tamen ofte interparolis, sed ni jarkunvenon ne sukcesis organizi.

La ambaŭ—prezidanto kaj vicprezidanto de nia asocio-renkontiĝis kun ekssekretario de TEĴA, Dino Fabris kiu promesis aktiviĝi. Oni sendu (la sekrecio) al li „I. J-ston“. Rezulte de tiuj interparoloj en Helsinko ni konsideras, ke ni devas agi estonte laŭ la ellaborita de Kavenius leteropiano, kiu devas esti aprobita ankaŭ de la sekretario Ivan Esperov, kiun leteron oni sendos al ĉiuj estraranoj de TEĴA.

Post pritrakto inter la prezidantoj kaj la sekretario la Leteron-planon oni dissendos al ĉiuj membroj, eventuale aperigos ĝin en „Internacia Ĵurnalistiko“.

La plano koncernas la problemojn pri fortkligo de la estraro de TEĴA kaj entute la agadon de Tutmonda Esperantista Ĵurnalistika Asocio. En la sekvanta n-ro de „I. J.“ tiu plano aperos pli detale.

*Verŝajne vi konas lin bone:
la samidean' sen komparo.
Konstante li vokas admone:
Ni venku en tiu ĉi jaro!*

*Li skribas, parolas tutlande,
tagnokte li distelefonas,
presaĵojn elverŝas milkvante
kaj por propagando nin spronas.*

*Li vokas nin same tamburi
la lingvon de la paradizo
kaj nepre kun steloj diskuri
de ĉapo ĝis nokta ĉemizo.*

*Viktimo de li mi konfesu:
la troa fervoro konsternas.
Ĉar kiel la lingvo sukcesu,
se ne li unue ĝin lernas?*

Poul Thorsen

RADIO ZAGREB: JAŬDE JE LA NOKTOMEZO

Esperantlingvaj elsendoj de Radio Zagreb ekzistas 16 jarojn kiel sola tiaspeca aktiveco en Jugoslavio. Ĝis nun estas 850 elsenditaj programoj, kiuj daŭris 12800 minutojn aŭ 214 horojn kaj ampleksas 6800 taĵpitajn paĝojn da materialo. La elsendoj de Radio Zagreb estas la sola esperantista aktiveco en Jugoslavio ekzistanta seninterrompe 16 jarojn en la kadro de grava neesperantista institucio, kiu komplete ebligas kaj financas ĝin.

La elsendoj estas parto de la Programo Unu de Radio Zagreb kaj kiel tiaj, ili devas sekvi la ĝeneralan programkoncepton de la direkcio. La programoj estas unuvice destinitaj al eksterlandaj esperantistoj kaj tial la unua parto de ĉiu elsendo estas „Novajoj el Jugoslavio“ kun informoj plejparte politikaj. La ceteran programparton konsistigas diversaj temoj: ekonomiaj, turismaj, literaturaj, ks.—Ĉiuj rilatantaj nur Jugoslavion. Elsendoj jaŭde, h. 24,05 laŭ MET, ondi 265 m. (El „LSS“)

JUNULOJ, KORESPONDU KUN NI!

La Junulara Esperanto-Klubo en Taŝkento establis internacian korespondan servon: celante apogi kaj disvolvi la rilatojn kun esperantistoj el la tuta mondo.

La korespondada servo sin turnas al la allanda junularo kun peto starigi amikan korespondadon kun ni. Siavice ni respondos al ĉiuj skribontoj kaj indikos adresojn de Taŝkentaj kaj aliaj esperantistoj dezirantaj korespondi.

Ni petas vin informi nin pri via plena nomo, hejma adreso aŭ adreso de via klubo (en okazo de kolektiva korespondado), aĝo kaj sekso, ŝatokupoj, temoj de korespondado, kion vi deziras interŝanĝi.

Nia adreso: Junulara Esperanto-Klubo (korespondada servo), abon. jaŝćik 140, Poĉtamt, T a ŝ k e n t, Uzbekio, USSR.

JURNALISTAJ REVUOJ EN LA MONDO

Eble la ĵurnalistoj—esperantistoj kaj la legantoj de „Internacia ĵurnalistoj“ interesiĝas pri la eldonataj nacilingvaj aŭ en aliaj lingvoj ĵurnalistaj revuoj — naciaj kaj internaciaj. Tial ni aperigas iliajn nomojn. La interesantoj bonvolu turni sin al iliaj eldonantoj — naciaj aŭ internaciaj ĵurnalistaj asocioj.

— *Preso Polska* — organo de la Polanda ĵurnalistika Unuiĝo, eldonata en Varsovo.

— *Balgarski ĵurnalist* — organo de la Bulgara ĵurnalistika Unuiĝo, aperas en Sofio.

— *Zeszyty Prasoznawcze*, polanda ĵurnalo, eldonata en Krakovo.

— *Vidura* — organo de la hindaj ĵurnalistoj, eldonas *Hindia Gazetara Instituto*.

— *Ĵurnalist* — organo de la sovetaj ĵurnalistoj, eldonata en Moskvo.

— *Journalism Quarterly* — usona ĵurnalistika revuo, eldonata de la Asocio por Edukado Gazetara, centro en Minnesoto, Minneapolo.

— *Magyar Sajto* (Magjar Ŝajto), organo de la Hungara ĵurnalistika Unuiĝo, eldonata en Budapeŝto.

— *Naŝa Stampa* — organo de la Jugoslavia ĵurnalistika asocio, eldonata en Beo-

grad.

— *Preso Noastra* — organo de la Rumana ĵurnalistika Unuiĝo, eldonata en Bukareŝto.

— *The Columbia Journalism Review* — eldonata de la Supera Lernejo por ĵurnalistoj, Kolumbia Universitato, New York, USA.

— *Journalism* — eldonata de la Punjab-a Universitato, Lahoro.

— *Neue Deutsche Presse* — organo de la ĵurnalistoj en Germana Demokratia Respubliko, aperas en Berlino.

— *Bulletin* — organo de la Internacia Unuiĝo de sportaj gazetoj.

— *Novinarstvo* — revuo de la Jugoslavia ĵurnalistika Instituto, aperas en Beograd.

— *Revue de Marche Commun* — organo de la ĵurnalistoj de la Eŭropa Komuneco Okcidenta.

— *The Working Journalist* — organo de la Hinda Unuiĝo de profesiaj ĵurnalistoj.

— *Dahier de l'IP* — franca ĵurnalistika gazeto.

— *Bolletino* de la Itala Nacia ĵurnalistika Federacio.

NOVAĴOJ EL HELSINKI

Radio Helsinko ĉiutage elsendis novaĵojn el la mondo de Esperanto.

Radio Helsinko ĉiutage dum la Universala Kongreso de Esperanto ĉijare en la ĉefurbo de Finnlando elsendadis matene je la 8,30 novaĵojn el la tuta mondo en Esperanto kaj tiujn novaĵojn la ĉeestantaj kongresanoj salutis kun simpatio, des pli ĉar la horo por la elsendoj estas la plej konvena ĉar ebligas la aŭskultadon.

La novaĵojn tradukis kaj legis s-ro Simo Rauhavirta. La informojn aŭskultis ankaŭ gesanoj kiuj ne partoprenis la Kongreson, kion pruvas pluraj poŝtkartoj kiuj atingis ĉu la Radion ĉu la Kongreson, ekz. la gratulkartoj de Birger Allmork ferianta en Aland-Föglö k. a.

Kunveno de „Informaj Fakoj“

La kunvenon okazigis la fakoj mem sub prezido de s-ro G. Becker kaj ĝin partoprenis 40 personoj el 13 landoj. S-ro Marinko Ĝivoje—estro de la E-branĉo de Gazetara Servo informis pri la stato de informado al la finna gazetaro kaj E-gazetoj, substrekante ke dank' al niaj klopodoj oni sukcesis aranĝi multajn intervjuojn kun di-

verslandaj pli elstaraj gesan'deanoj. Estis prezentitaj spertoj pri informado en diversaj landoj kaj oni substrekis la sugestojn de la Informa Fakoj de UEA laŭ la principaro de Frostavallea.

Esperanta-angla-ĉina

Ankaŭ la Informa Fakoj de UEA multe kontribuis al la kampanjoj. La Informa Fakoj konsistas el multaj individuaj kunlaborantoj en diversaj landoj. La kunlaborantoj ricevas regule informojn en la Internacia Lingvo. La informojn ili tradukas en naciajn lingvojn kaj publikigas en nacilingvaj gazetoj. Tiamaniere, ekzemple, la grava artikolo „Kultura genocido kaj Homaj Rajtoj“, verkita de prof. Ivo Lapenna, aperis unue en Esperanto en la oficiala revuo de UEA. La kunlaborantoj de la Informa Fakoj tradukis ĝin en siajn naciajn lingvojn, kaj ĝis nun la artikolo jam aperis en tradukoj hispana, franca, itala, germana, angla kaj ĉina. La ĉina traduko aperis en gazeto en Tajvano. Iom stranga, ĝi estis farita surbaze de la usona traduko!

Redaktoro : Ivan Keremidiev — Esperov, blv. Hristo Botev 98
Sofia 2, Bulgario, tel. 83-34-04
Helpredaktoro : Petja Ĉakova